3a Jarkolekto
Abonprezo 73
20,--GM
Pĉk, Nürnberg
819 56 - 851

PILO-PRESS
Interncia Informservo

Eldonanto/Herausgeber:
Ludwig Pickel
Postfach 2113
D-85 Nürnberg 2
Tel. (09 11) 46 36 49; 51 42 69

N-ro 1/1973 3 jan 73
Aperas ĉiusemajne

## Nova Jaro - Nova Espero

Sub la supra proverba slogano la Esperanto-Redakcio de Pola Radio prezentis sian novjaran Esperanto-ekspreson. Ankaŭ Pilo-Press komencas la Novan Jaron kun nova espero. Daŭru tiu espero dum la tuta jaro kaj transformiĝu ĝi en pozitivan laboron kaj sukcesan agadon por Esperanto!

## UEA-estraro kunsidis

Rotterdam (PP) La estraro de UEA kunsidis en la Centra Oficejo la 29 kaj 30 dec 1972. Pilo-Press havis okazon paroli post la kunsido kun la ĝenerala sekretario de UEA, Günther Becker, silvestre dum la Internacia Seminario de GEJ en Darmstadt.

Unu el la plej gravaj punktoj de la tagordo estis la Universala Esperanto-Kongreso en Beogrado 1973, pri kies preparoj raportis la ĉeestantaj LKK-anoj, Inĝ. Momĉilo Šaponjiĉ kaj prof. B. Popoviĉ. Gravaj jugoslaviaj personoj, ministroj, universitataj rektoroj, sciencistoj ktp. jam eniris la honoran komitaton.

Rilate al la Beograda Kongreso la UEA-estraro faris jenajn decidojn:

La kongresa ĉeftemo estos: Lingva egalrajteco en teorio kaj praktiko Alia kongresa temo estos: Ĉu Esperanto povas sukcesi sen lokaj grupoj? Oni ankaŭ fiksis la temojn por la Oratora Konkurso, nome

1) Kion celas la nuntempa junularo?
2) Ĉu povas ekzisti internacia kulturo?
3) Lingvoj kiel portantoj de kulturaj valoroj
4) La studentaro kaj la ĝenerala publiko

Kiel Pilo-Press krome eksciis, la vicprezidanto de UEA, E.L.M. Wensing, retiriĝis el sia funkcio.

Krome la estraro diskutis pri rutinaj aferoj, organizaj, teknikaj, financaj kaj personaj.

*************

## Nova intensivkurso inaŭgurita

Paderborn (PP) En ĉeesto de honoraj gastoj, de gazetaro kaj televido merkrede, la 3 jan 73 estis solene inaŭgurita la dua intensivkurso de Esperanto por geinstruistoj, aranĝita de AGEI, landa sekcio NRV (Nordrejn-Vestfalio), sub gvidado de Hermann Behrmann, kiu prelegis pri la "lingvista profilo de la internacia lingvo". Uwe Joachim Moritz skizis la situacion de "Esperanto en lernejo kaj universitato" en NRV.

La kurson partoprenas 25 personoj, inter ili 2 jugoslavoj.
La regiona televido de WDR raportos pri la inaŭgura ceremonio lunde, la 8 jan 73, je la 19,15 h en sia 3a programo, rubriko "Prisma des Westens".

## GEJ-Seminario 1972/73

Darmstadt (PP) La 3an de jan 73 finiĝas la ĉi-jara internacia seminario de Germana Esperanto-Junularo, kiun partoprenis 65 gejunuloj el 15 landoj. Raporton legu sur alia loko. Dum la seminario okazis Esperanto-ekzamenoj, kiujn partoprenis 11 personoj.

La manipulata homo

Darmstadt (PP) De la 27 dec 72 ĝis la 3 jan 73 okazis la 16a Internacia Seminario de Germana Esperanto-Junularo (GEJ) en junulara domo ĉe la urba rando de Darmstadt.

La seminario kun 65 partoprenantoj el 15 landoj traktis la temon "La manipulata homo". Oni laboris en tri programblokoj:

I. Reklamo (Anton Oberndorfer)
Manipulado pere de amasmediaj kanaloj (Brian Moon)

II. Psikologiaj testoj (C. Nourmont)
Manipulado de sociaj statistikoj (J. Pool)
Minoritatoj (H. Bakker)

III. Konceptoj pri politikaj kontraktoj (Guido Bertucci)
Grupdinamikaj metodoj ( K. Salzmann)
De informoj al informilo (P. Peeraerts)

En la kadro de la seminario okazis la ĝenerala membrokunveno de GEJ, kiu pasis harmonie kaj fruktodone dum 3 horoj je la silvestra tago. Estis elektita 6kapa estraro de GEJ:

Helmut Klünder, prezidanto; Hans-Dieter Platz, vicprezidanto kaj kasisto; Ingrid Maier, Seminarioj; Franz Kruse, sekretariaj aferoj, informado, loka kaj regiona agado; Ulrich Brandenburg, Internaciaj Junularaj Kunvenoj (IJK); G.D. Winkler, TEJO-novaĵoj TTN en germana lingvo.
Dum pasko 1973 okazos renkontiĝo kun aŭstraj junuloj kaj pentekoste 73 GEJ renkontiĝos en Luksemburgo.

Aliaj seminariaĵoj

Ekzamenoj. 11 partoprenantoj pasis kun sukceso lingvoekzamenon de Germana Esperanto-Instituto, 5 la elementan, 6 la superan.

Trinki Esperanton povis la seminarianoj. Vinberkulturisto Hans-Dieter Platz, D-6731 St. Martin, Maikammerer Str. 21 faris okaze de la GEJ-seminario specialan enboteligon de sia tabla vino "Esperanto". La vino blanka estas havebla ankaŭ post la seminario. Se vi vizitos la germanan vinstraton, aĉetu kaj trinku la fluidan bongustan Esperanton!

Ingrid kaj Winfried de la Konstanta IS-Komitato malfermis la silvestran balon laŭ neĝbula maniero. En la bele iluminita salono regis gaja atmosfero, kiu atingis sian kulminon noktmeze je precize la unua novjara sekundo.

Esperanto-libroj. Dum la lastaj horoj de la jaro 1972 libroservo Ludwig Pickel vendis vendis Esperanto-librojn kun bona sukceso al la seminarianoj. Post la noktmezo la restaj libroj denove estis survoje al Nürnberg.

Günther Becker, ĝenerala sekretario de UEA, revene de la estrarkunsido de UEA en Rotterdam, pasigis la silvestran vesperon kaj nokton en la seminaria rondo. La seminaria rekordulo bonege ĝuis la silvestran atmosferon.

************

Pedagogia Seminario

Primoŝten. Kiel dum la pasintaj jaroj Kroatia Esperanto-Ligo ankaŭ ĉi-jare, de la 5 - 22 jul 73, okazigos pedagogian seminarion por instruistoj kaj pedagogoj en Primoŝten, kiu enhavos tri grupojn: A - B - C. A-kurso estas elementa, dum la B kaj C estas perfektigaj kaj porinstruaj.

Esperanto en "Dua Germana Televido" (ZDF)

Hamburgo (webo) Por dissendo en la vespera: informa programo "Drehscheibe" (Turndisko) iam komence de 1973 la Dua Germana Televido filmis ĵus antaŭ Kristnasko scenojn pri mondlingvaj aferoj. Iniciatinto estis la "lingvokreisto" Mansfeld, kiu postulas kreitan lingvon (novan, ne Esperanton). D-ro Werner Bormann povis en 25-sekunda intervjuo meti Esperanton en la ĝustan pozicion. Li estis filmita antaŭ la ĵus pretiĝinta kongresejo Hamburgo, kie okazos la 59-a Universala Kongreso de Esperanto; pri tio la parolisto atentigos. Poste estis filmita sceno de interparolo inter s-roj Bormann kaj Schütt, kiujn demandas s-ino Wielgus.

Germanaj esperantistoj, kiuj hazarde vidos la programon, bonvolu informi la redakcion de Pilo-Press.

********

Aŭdienco ĉe itala ministro

Romo (adeso) La 14 dec 1972 delegacio de italaj esperantistoj estis akceptita en aŭdienco de la itala ministro pri Publika Instruado, deputito Oscar Luigi SCALFARO. La delegacio konsistis el inĝ. Giordano Azzi, prezidanto de la Itala Esperanto-Federacio, profesorino pri beletro kaj Esperanto-poetino Clelia Conterno Guglielminetti, kaj doktoro Antonio de Salvo, redaktoro de Radio Roma, kaj ĝis la fino de novembro, juristo ĉe Ministerio pri Publika Instruado.
La aŭdienco, kiu daŭris preskaŭ unu horon, disvolviĝis en tre simpatia kaj afabla atmosfero. La ministro montris sufiĉan informitecon pri Esperanto kaj ĝia movado, ankaŭ danke al la fakto, ke li jam havis kontaktojn, dum ĵusa pasinteco, kun la internacia lingvo. Oni ne devas forgesi, ke deputito Oscar Luigi Scalfaro, konata eŭropisto kaj larĝmensa persono, jam konkrete pruvis sian favoron al Esperanto, kiam li estis ministro pri transporto: ĝuste al lia decido ŝuldiĝas la enmeto de Esperanto inter la lingvojn uzatajn en la klarigoj de la oficiala horarlibro de la italaj fervojoj.
Oni parolis al la ministro pri la leĝpropono por instruado de Esperanto en la italaj lernejoj mezgradaj, kaj aparte oni emfazis, ke la leĝpropono estas preta por diskuto, jen ĉar deputito Reggiani, membro de la koncerna parlamenta komisiono, jam oficiale petis diskuti ĝin, ĉar la diversaj ĝeneralaj direkcioj de la ministerio pri publika instruado jam esprimis sian opinion pri la teksto de la leĝpropono, kiu estis, ĝenerale, favore taksita. La ministro promesis, ke li faros ĉion, kio estas bezonata por baldaŭa diskuto de la leĝpropono, kaj ke ĉiukaze oni memoros pri Esperanto okaze de la nuntempe preparata reformo de la mezgradaj studoj.

Tuj post la aŭdienco ĉe la ministro pri publika instruado, la esperantista delegacio estis akceptita de la Kabineta Estro, speciale komisiita de la ministro por pridiskuti la teknikajn flankojn de la diversaj aferoj pritraktitaj. - En la Kuriero de Esperanto de la 24 dec 72 Radio Roma detale traktis la ĉirilatajn temojn kaj venis al la konkludo, ke leĝpropono kaj universitata instruado de Esperanto estas irenda vojo por atingi la plenrajtan enkondukon de Esperanto.

Nova konkurso de Pola Radio

Varsovio (PR) Kiel konate, la jaron 1973 oni anoncis Jaro de la Pola Scienco. Oni solenos dum ĉi tiu jaro historiajn datrevenojn de la pola scienco: la 500-an de la naskiĝo de Nikolao Kopernik, la 200-an de la kreo de la komisiono por la Nacia Edukado - la unua en Eŭropo edukministerio, la 100-an de la Pola Akademio de la Scioj. En ĉi tiu jaro okazos la Dua Kongreso de la Pola Scienco.

Lige kun tio ĉi ni turnas nin al vi kun la peto respondi al la jenaj demandoj:

- Kiujn atingojn de la polaj sciencistoj vi konas? Kiujn el ili kaj pro kio vi pritaksas plej alte?
- Bonvolu mencii la konatajn al vi faktojn pri la partnereco de Pollando en la internacia scienca kaj teknika kunlaboro.
- Kiuj personoj de la pola deveno partoprenis en la evoluigo de la kulturo kaj civilizacio en via lando?

La aŭskultado al la elsendoj de la Pola Radio faciligos al vi respondi la suprajn demandojn. La respondo al almenaŭ unu el ĉi tiuj demandoj rajtigas vin partopreni la lotadon de la premioj.

La konkursaĵojn oni sendu al: Polskie Radio, Esperanto-redakcio, Varsovio 1, P.O.B. 46, Pollando, en kovertoj signitaj per la vorto KONKURSO, ĝis la 15-a de marto 1973 - decidas la dato de la poŝta stampo. La rezultoj de la konkurso estos anoncitaj la 16-an de aprilo 1973. Al la partoprenantoj de la konkurso estos atribuitaj multaj premioj:10-tagaj ekskursoj tra Pollando, premioj kaj suveniroj.

Pola Radio, Esperanto-Redakcio

****************

La semajno en la radio (PP)

Multaj bondeziroj novjaraj traflugis la eteron de Varsovio, Berno, Romo kaj Zagrebo. Se ĉiuj realiĝos, ĉiuj esperantistoj bonfartos dum la tuta jaro,kaj la E-movado faros grandan paŝon antaŭen! Zagrebo 1973 havos 20-jaran jubileon de siaj E-elsendoj. Jam nun koran gratulon al Zagrebo kaj ĝiaj simpataj geparolistoj. La lasta elsendo de 1972 estis denove dediĉita post la novaĵoj al la korespondaĵoj de aŭskultantoj kaj la ricevitaj periodaĵoj. - Berno daŭrigis sian leterkestan interparolon kaj A. Baur prelegis pri la libro "La malvarma paradizo", verkita de ĉeĥaj rifuĝintoj. Speciale interesis la rimarkoj pri la svis-germana lingvo. - La dimanĉa, silvestra elsendo de Radio Romo ne nur suferis pro atmosferaj perturboj, sed same pro la dancada bruo dum la silvestra balo de la GEJ-seminario en Darmstadt.- Varsovio. La Novjara programo de Varsovio donis al ni multajn resumojn jarfinajn. Oni denove aŭdis la voĉojn de la antaŭmikrofonaj gastoj dum la jaro 1972. La E-ekspreso elradiis gajan tonon kun multaj proverbaj saĝaĵoj kaj la leterkesto donis iomete da statistiko miksita kun refekcioj pri la personoj de la aŭskultantoj kaj la enhavo de iliaj korespondaĵoj prezentitaj de J. Grum kaj M. Dastych. 2 500 korespondaĵojn Varsovio ricevis dum 1972.